Jean de La Fontaine,

# Die Grille und die Ameise

*tradukita de Wilhelm Ernst Dohm*

Grillchen, das den Sommer lang
Zirpt' und sang,
Litt nun, da der Winter droht',
Harte Zeit und bittre Not:
Nicht das kleinste Würmchen nur
Und von Fliegen keine Spur!
Und vor Hunger weinend leise,
Schlich's zur Nachbarin Ameise,
Fleht' sie an in ihrer Not,
Ihr zu leihn ein Körnlein Brot,
Bis der Sommer wiederkehre.
"Glaub' mir," sprach's, "auf Grillenehre,
Vor dem Erntemond noch zahl'
Zins ich dir und Kapital."
Emschen, das, wie manche lieben
Leute das Verleihen hasst,
Fragt die Borgerin: "Was hast
Du im Sommer denn getrieben?" -
"Tag und Nacht hab' ich ergötzt
Durch mein Singen alle Leut'."
"Durch dein Singen? Sehr erfreut!
Weißt du was? Dann tanze jetzt!"

. . .

Jean de La Fontaine,

# La cikad' kaj la formik'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sonis dum somer' kantad'
De cikad'.
Kiam venis la jarfin'
Sen proviz' ĝi trovis sin;
Ĉar ne estis ie de
Muŝ' aŭ verm' pecet', pro ve'
Kaj malsat' ĝi turnis sin
Al Formik', la najbarin',
Ŝin petante pri paner';
Ĉar grandegis la mizer'.
"Ĝis la nova kant-sezon'
Iĝos ja de mi redon'."
Ĵuris ĝi, "kaj pagos mi
Interezon ĝis Juni'!"
La formiko, kiu vere
Ne pruntdonon ŝatis tre,
Diris: "Mi ĝin donos ne!
Kion faris vi somere?" -
"La pasantojn per muzik'
Mi ĝojigis ĝis aŭtun'."
"Mi tre ĝojas, dancu nun!"
Diris tiam la formik'.

. . .

Jean de La Fontaine,

# Cikado kaj formiko

*tradukita de Antoni Grabowski*

Kantis dum somer' sen fin'
Cikadin'.
Kiam frosta vento blovis
Sen provizo ŝin ektrovis,
Sen malgranda eĉ pecet'
Da muŝeto aŭ vermet';
La malsato pelis ŝin
Al najbara formikin'.
Kaj ŝi petis kun insisto:
"Donu grajnojn por ekzisto
Ĝis la nova jar-sezon'.
Mi vin pagos, laŭ ordon',
En Aŭgust', pro best-honor',
La procenton kun valor'."
Ke ne pekas formikino
Per pruntemo, estas vere;
"Kion faris vi somere?"
Diris ŝi al pruntulino.
–"Tage, nokte al venantoj,
Ne mallaŭdu – kantis mi."
–"Kantis? – gaja jen meti'!
Nun ekdancu post la kantoj!"

. . .

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de* Jean de La Fontaine *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en la Germanan de* Wilhelm Ernst Dohm *(Geburtsname: Elias Levy, ∗1819-05-24 – †1883-02-05).*

*Arg-549-1104 (2010-07-09 22:21:39)*

*Pri la tradukinto Wilhelm Ernst Dohm vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Dohm`.
*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-germanigon en la libro "Jean de La Fontaine: Die Fabeln" (Gesamtausgabe in deutscher und französischer Sprache, Emil-Vollmer-Verlag, Wiesbaden.)*

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de* Jean de La Fontaine *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983.*

*Arg-549-1105 (2010-07-09 23:08:07)*

*Traduko de la Franca poemo "La Cigale et la Fourmi" de* Jean de La Fontaine *(∗1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de* Antoni Grabowski *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-549-1108 (2014-03-16 17:39:47)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi tradukon en* `http://www.babelmatrix.org/works/fr La_Fontaine,_Jean_de/La_cigale_et_la_fourmi/eo/5026-Cikado_kaj_formiko`.
*Ĝi troviĝas ankaŭ en la retejo de la usona esperantisto Don Harlow* `http://donh.best.vwh.net`.
*Pri la tradukinto vidu la vikipedion retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski`.
*Vidu ankaŭ:* `http://eo.wikisource.org/wiki/Cikado_kaj_formiko`.